JARO 2016 #2


ESPÉRANTO NORD
www.esperanto-nord.org

18 APR 2016

# NORDA ✫ KURIERO

## Ni jarkunvenu en Araso la 1an de majo!

La Nordfrancia Esperanto-Federacio invitas vin partopreni en ĝia jarkunveno **dimanĉon la 1an de majo** en Araso: salle de l'AGAEM, 11 place de l'Ancien-Rivage, 62000 Arras. La kunveno okazos de la 10:00 ĝis la 12:00; sekvos komuna manĝo en proksima restoracio (po 20 €). Posttagmeze la federacianoj vizitos la libran festivalon *Salon du livre d'expression populaire*: ĝi kutime akceptas 10 000 homojn, kaj staros Esperanto-budo de la Arasa klubo!






## Malkovri Dagestanon




La Lilla klubo organizos prelegon de la ĵurnalisto Abduraĥman Junusov el Dagestano, membra respubliko de Rusia Federacio, **merkredon la 18an de majo** je la 19:00 en Lillo (MRES, 23 rue Gosselet). Tiu prezidinto de la Rusia Esperantista Unio rakontos kaj diskutos pri "**Dagestano inter Eŭropo kaj Azio**: geografio, historio kaj nuntempo". Li prezentos diversajn filmojn, fotojn kaj objektojn. Fine eblos komune vespermanĝi en apuda restoracio.

## Ili dancis tutmonde!

Dimanĉon la 20a de marto la Arasa klubo kaj Roch Jullien dancigis ĉ. 25 esperantistojn kaj ne-esperantistojn okaze de la aranĝo "Dancu Tutmonde". Regis amikeca kaj ĝoja etoso dum la tuta tago.



# Finiĝos la lernjaro per ekzamenoj kaj festo

La Federacio organizos la ĉiujaran ekzamensesion de Franca Esperanto-Instituto (FEI) kun la unua kaj dua gradoj **sabaton la 18an de junio** de la **13:00** ĝis la 17:30 en Lillo (MRES, 23 rue Gosselet). La kluboj kaj kandidatoj bonvolu anonci la ekzameniĝojn kiel eble plej frue al Michel Dechy*.
(* tel.: 06 16 98 41 02 – mdechy@esperanto-nord.org)

Tuj post la sesio, je la **17:30**, la Lilla klubo invitos la ekzamenitojn, siajn dumjarajn lernantojn kaj la esperantistojn por festi la finon de la lernojaro per sukera-sala aperitivo kun ludoj. Jen bela okazo por adiaŭi antaŭ la somero!



*Foto: KER-ekzamensesio de 2012 en Araso*

# Promenado en la Flandraj Ardenoj



La Kortrejka klubo okazigos la ĉiujaran Tagon de la Flandraj Ardenoj dum **dimanĉo la 24a de aprilo**. Ekde la 9:00 la grupo vizitos naturrezervejon en Zegelsem, kaj posttagmeze la hospitalon Notre-Dame à la Rose (13a jarcento) en Lessines. Tie ĉi videblos rimarkinda kolekto de malnovaj kuracaj kaj kirurgiaj iloj.

## BALDAŬAJ RENKONTIĜOJ



**Landa kongreso de Espéranto-France:** ĝi okazos de la 5a ĝis la 8a de majo en Marsejlo. Pli da informoj ĉe: www.esperanto-france.org

**Universala Kongreso de Esperanto:** ĝi okazos de la 23a ĝis la 30a de julio en Nitro (Nitra), Slovakio. Pli da infomoj ĉe: www.uea.org/kongresoj


### KOLOFONO

La ***Norda Kuriero*** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio.

Redaktis: Katja Boen, Xavier Dewidehem.
Enpaĝigis: Xavier Dewidehem.


Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso: ***kuriero@esperanto-nord.org***

**MEM VERKIS… EŬGENO ERNOULT**

# La masakro de Ascq la $1^{an}$ kaj $2^{an}$ de aprilo 1944

## Villeneuve-d'Ascq

La nova urbo, kreita en 1972 el 3 komunumoj: Ascq [ask], Annappes [anap] kaj Flers, unue alprenis la nomon "Villeneuve-en-Flandre" (Nova Urbo en Flandrio). Sub la premo de la familioj de la viktimoj de la masakro de Ascq, la nomo estis ŝanĝita al "Villeneuve-d'Ascq. Ĉiujare la urbo solene memorigas la krimon de *Waffen SS* dum la nokto de la Palmofesta dimanĉo, la $1^{an}$ kaj $2^{an}$ de aprilo 1944. Tiam Ascq estis paca vilaĝo (ĉirkaŭ 3 000 loĝantoj), sed tre aktiva pro multaj tre agemaj homoj en diversaj viglaj asocioj. Multaj el ili estis mortigitaj dum la masakro, precipe Gaston Baratte, kies nomo estos donita al la plej grava strato de la vilaĝo.




## Nia loĝejo dum la milito 1939-1945

La plano montras la poziciojn de: (1) la stacidomo; (2) mia familia domo; (3) notaria oficejo; (4) barilo, kiu dividas la ĝardenon en du partojn.

La germanoj rekviziciis nian domon, tial ke ni rifuĝis en la notarian oficejon de mia patro (tro malvasta por familio kun 9 infanoj; kiel internulo mi revenis hejmen nur semajnfine). Tiuj germanoj estis "pacemaj", tamen estis malpermesite iri en "ilian" hejmon. Instalado de kradbarilo dividis la ĝardenon en du partojn.

## La rezistado



La rezistado estis tre aktiva en la regiono, okazis multaj atakoj kaj sabotadoj. Laŭ la germanoj: rezistado = terorismo. La "teroristoj" pensis, ke la trajno pasos dum la vespero de la $1^{a}$ de aprilo transportante militan materialon. Ili ne sciis, ke la trajno ankaŭ veturigos unuon de la $12^{a}$ divizio de la *Hitler Jugend*.

Kompreneble ili subtaksis la amplekson de la germana reago. Pro la multnombraj atakoj sur fervoja linio Tournai–Ascq–Lille la generalo komandanta la okcidentajn fortojn ordonis al siaj trupoj respondi violente, eĉ se estus civilaj viktimoj. Tiukaze la soldatoj ne estus punitaj.

## Terura nokto

Kiel ĉiusabate, mi revenis hejmen. Ĉio estis trankvila en la vilaĝo. Post vespermanĝo, kiel kutime mia lito estis preparita en la arĥivoĉambro: matraco sur la kadastro (mapoj de la bienoj). Lundon matene, mi estis devonta nepre reordigi ĉion antaŭ la alveno de la notariaj oficistoj. Ĉirkaŭ la 22:30 ni vekiĝis pro bruego. Teruraj pafoj, detruitaj pordoj, soldatoj kriegis germane! La vitropaneloj de la ĉefpordo eksplodis. Unu el miaj fratinoj, dormante en la teretaĝo en eta oficejo, timegis. Ŝi rapide grimpis la

# LA MASAKRO DE ASCQ (SEKVO)

ŝtuparon por esti kun ni. Pro la sabotado ĉie mallumis. Mia patro volis malfermi la pordon por vidi, kio okazis ekstere. Feliĉe ni sukcesis konvinki lin, ke li rezignu. Iom post iom la ekstera etoso trankviliĝis, tamen ni malfacile ekdormis.

## La sekvantan matenon

En nia katolika familio, ni preparis nin por la Palmofesto, meso je la 7:30. Sonorado kutime anoncis tiun meson je la 7:00 kaj poste je la 7:15. Tamen nenio! Maltrankvile ni paŝis al la preĝejo. Tiam najbaroj anoncis al ni la teruran masakron. Dekoj da viktimoj, eĉ la parokestro kaj la vikario estis mortpafitaj. Ĉe la pordo de la preĝejo ankoraŭ aperis sangoflako.




Mia plej aĝa fratino (dudekjaraĝa) transportis la viktimojn en grandan funebran ĉambron. Miaj gepatroj taksis min tro juna por helpi mian fratinon. Lunde ili resendos min al mia lernejo. La korpoj de la viktimoj estis kolektitaj en ĉi tiu lerneja grupo (vd. la foton).

## Kio precize okazis?

Leŭtenanto Hauck regis la taĉmenton. Li ordonis ke oni venigu la virojn sur la trakon vicigante ilin dudekope. Por pli facile forpreni la virojn, la soldatoj mensoge trankviligis la virinojn: “Via edzo riparos la fervojon!” Fakte la nazioj tuj poste brutale mortpafis ilin kvarope. Plie, mitralo proksime instalita buĉis la fuĝantojn. Nur kelkaj vunditoj sukcesis supervivi ŝajnigante sian morton.

Malgraŭ siaj vundoj la staciestro Élie Derache telefonis al la germana polico de Lille je la 23:30 por informi pri la masakro. Ankaŭ la germanoj el *Kommendantur* 908 de *Wehrmacht*, postenitaj en nia domo, informis siajn superulojn.

Taĉmento de *Felgendarmerie* regata de leŭtenanto Fricke ordonis al la *Waffen SS* haltigi la masakron. Mirakle la lasta grupo, en kiu troviĝis la urbestro, eskapis la morton. Entute 86 homoj kruele mortis tiun teruran nokton. Ili aĝis de 17 ĝis 75 jaroj.



## LA MASAKRO DE ASCQ (SEKVO)

### La funebra ceremonio



Post la "infero", kiu okazis dum tiu sanga nokto, kardinalo Liénart skribis protestleteron al generalo Falkenhausen. La germanaj sekretaj servoj rajtigis la kardinalon prezidi la entombigon de la viktimoj de la masakro la $5^{an}$ de aprilo 1944. Mi partoprenis tiun kortuŝan ceremonion: impresa amaso da homoj unuanime ŝokitaj kaj silentaj. Nuntempe mi daŭre tion memoras, kvazaŭ ĝi okazis hieraŭ.

### La juĝo



*Leŭtenanto Hauck en la juĝo*

La $2^{an}$ de aŭgusto 1949 estis malfermita en la kortumo de Lille la juĝo de la *SS* divizio respondeca pri la masakro de Ascq. Dum du tagoj ili gurde ripetis, ke ili obeis al ordonoj. La $6^{an}$ de aŭgusto 1949 Hauck kaj 8 el liaj komplicoj estis kondamnitaj al morto. Kompreneble, advokatoj apelaciis al la Supera Tribunalo. Tiu apelacio estis malakceptita la $3^{an}$ de junio 1950. En Pentekosto 1955 kelkaj vidvinoj pro sia katolika fido volis pardoni kaj sendis leteron al prezidento Coty [koti]: "Estis sufiĉe da sango dum tiuj lastaj 15 jaroj. Kial aldoni tiun de la komdamnitoj?" Ankaŭ kardinalo Liénart petis per letero sendita en 1950.

La $14^{an}$ de julio 1955 prezidento Coty subskribis la dekreton, kiu indulgis ilin. Nur leŭtenanto Hauck, ĉefa responsulo de la masakro, estis poste kondamnita al dumviva punlaboro. Fakte, du jarojn poste, li estis liberigita kaj revenis al Germanio.

### La memoro





Maldekstre: la tomboj de la 86 viktimoj en la urba tombejo.

Dekstre: "Memorial Ascq 1944". Origine la monumento estis kliniko. En 2004 ĝi estis transformita en muzeon. Ĝi situas tie, kie okazis la masakro dum la nokto inter la $1^{a}$ kaj la $2^{a}$ de aprilo 1944. Ĝi celas eternigi la memoron pri tiuj viroj. Ĝi estas loko de interkompreno pri historio, kun mesaĝo de paco kaj frateco.



*La nuna urbestro Gérard Caudron deponas florkronon*



*La steleo de la masakro*



*Ĉiu infano perdis sian patron*



*Abato Cousin, vikario brutale murdita*